KOMUNIKOJ
TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 47-a BRAZILO, APRILO-MAJO-JUNIO 2023 N-ro 190

"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem." Jesuo (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro." Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian." Zamenhof. *La Espero.*

# Omaĝo de Lorenz pro la elkarniĝo de du noblaj samideanoj. José Passini kaj Guiseppe Grattaplagia





## *José Passini*

**LA 19-AN DE MAJO 2023,** 97-a jara, elkarniĝis en la brazila urbo Juiz de Fora, nia frato, amiko, ano de nia Eldonejo, profesoro, eksrektoro, José Passini.

Kun plej granda sento de danko kaj admiro al la eminenta forpasinto, nia Eldonejo per ĉi tiuj paĝoj omaĝas nian tre karan fraton. Sen ia dubo, Passini estis tiu giganto, kiu ĉiam liveris al ni belajn ekzemplojn kiel homo, patro, spiritisto, profesoro, esperantisto, disĉipulo de Jesuo, Kardec kaj Zamenhof, vera Homarano!

Passini estis tre aktiva esperantisto, verkis diversajn kronikojn, inkluzive por niaj revuoj Almanako Lorenz kaj Komunikoj, multe prelegis en/pri Esperanto, aŭtoro de la verko en la portugala lingvo Bilinguismo: Utopia ou antibabel, kaj estis ankaŭ prezidanto de Brazila Esperanto Ligo. Produktema homo!

Do, karaj gelegantoj, jen interesaj tekstoj pri nia karmemora frato, kiam li estis intervjuita de Almanako Lorenz 2015.

Kun la certeco ke la vivo daŭras post la fino de la fizika korpo kaj denove ni renkontiĝos: ĝis baldaŭ, kara frato Passini!

*La Estraro*
*Eldonejo Lorenz*



# José Passini

Vortoj de José Pasini, okaze de la intervjuo em *Almanako Lorenz 2015*.

## NASKIĜO, FAMILIO, PROFESIO...

Mi estas brazilano, profesoro, spiritisto kaj esperantisto. Mi naskiĝis em 1926, em Nova Itapirema, Ŝtato San-Paŭlo, sed dum mia infaneco mia familio translokiĝis al urbo Lins, kie mi loĝis ĝis la fino de lerneja duagrada kurso. Monatojn antaŭ dudekjariĝi, mi eniris aerarmeon kaj fariĝis teknikisto pri aviadilaj elektraj sistemoj. Post tri jaroj, mi translokiĝis al vilaĝo en la ŝtato Minas Gerais por labori ĉe konstruado de fervojo. En 1953, mi translokiĝis al la urbo Juiz de Fora, kie mi loĝas ĝis nun.



Passini, 1945, diplomiĝo en duagrada lernejo

## ESPERANTO

Mia intereso por Esperanto naskiĝis kiam mi estis ankoraŭ infano, ĉar mi legadis propagandon de tiu lingvo sur la kovriloj de spiritismaj libroj en mia hejmo. La nomo kaj la ideo de lingvo internacia restis en mia menso, sed mi havis oportunan okazon lerni ĝin, nur kiam mi translokiĝis al Juiz de Fora. Ĉi tie mi lernis Esperanton kaj en la sekvinta jaro mi komencis instrui ĝin. Esperanto reprezentas multe pli ol vi povas imagi. Kiam mi estis preskaŭ tridek ok jara mi eniris universitaton celante estontan oportunon instrui Esperanton kiam eble, sed tiutempe mi ne imagis fariĝi profesoro nek profesia instruisto.



Passini partoprenas Brazilan Kongreson de Esperanto en la bela urbo Juiz de Fora

## AGADO EN LA E-MOVADO

Tuj post kiam mi lernis Esperanton, mi komencis mian agadon kiel instruanto de Esperanto en nia loka societo, Kultura Esperanto-Asocio, kaj poste en spiritismaj centroj, en la Associação Cultural Brasil-Estados Unidos kaj en la Federala Universitato de Juiz de Fora.

En la Esperanta movado, mi okupis diversajn postenojn:

- prezidanto de nia loka societo;
- prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo;
- membro de Brazila Esperanto-Ligo ekde 1962;
- membro de UEA ekde 1962;
- delegito kaj fak-delegito pri lingvistiko ĉe UEA.

→



José Passini

### LINGVOJ

Mi konis la italan ankoraŭ kiel infano. En gimnazio mi lernis la francan kaj la anglan. En universitato mi lernis la latinan kaj diplomiĝis pri la angla kaj la itala. La hispanan mi lernis iomete kiel memlernanto. Kiam mi lernis Esperanton, tiu kono de pluraj lingvoj ebligis al mi la kapablon konstati la facilecon de Esperanto kompare kun naturaj lingvoj.

### KURIOZAĴO EN LA ESPERANTISTA MOVADO


La kono de Esperanto ŝanĝis komplete mian vivon. Mi neniam interesiĝis pri beletroj, sed celante la instruadon de la Internacia Lingvo, kiam mi estis tridek ok-jara, mi eniris universitaton por fariĝi instruisto pri beletro, kio rajtigus min instrui Esperanton kiam oportune. Ankoraŭ kiel studento, mi estis invitata instrui la portugalan, la anglan, la italan en pluraj lernejoj. Iom post iom, mi lasis mian teknikan profesion kaj fariĝis instruisto pri lingvoj. Tri jaroj post mia diplomiĝo, mi faris konkurson kaj fariĝis profesoro de Federala Universitato de Juiz de Fora, kie mi instruis Esperanton. Post kelkaj jaroj, mi magistriĝis en Pontifika Katolika Universitato de Rio-de-Ĵanejro kaj doktoriĝis en Federala Universitado de Rio-de-Ĵanejro. En ambaŭ universitatoj mi defendis tezon pri komparo de Esperanto kun naciaj lingvoj.

### LA SPIRITISTO

Miaj gepatroj jam estis spiritistoj kiam mi estis infano. Mi konas aliajn religiojn ĉar mi interesiĝas pri ties studado. Mia duagrada lernejo estis metodisma.

→




## FINFINE, JEN LA ALMANAKO LORENZ 2023!

**Lanĉo:** Kunveno de Lorenz ĉe la Universala Kongreso en Torino, Italio.

Verkistoj el diversaj landoj partoprenas la ĉi-jaran Almanakon per neeldonitaj kronikoj. Sendube, Almanako estas leginda libro, kiujn ĉiuj studemaj esperantistoj devus akiri.

Akiru vian ekzempleron ĉe la Libro-servo de UEA dum la Kongreso en Italio.





| **KOMUNIKOJ** | Jaro 47-a
| n-ro 190 | Aprilo-Majo-Junio | 2023
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ
Fondita la 15-an de Decembro 1975
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
+55-21-98427-8080
Librovendejo: editoralorenz.com.br
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Fejsbuko: Editora Lorenz

| Kompostita de Rogério Mota |



José Passini

## SPIRITISMO

Lumo, kiu lumigas miajn pensojn, parolojn kaj agojn. Spiritismo estas nedisigebla de mia ĉiutaga vivo. Tia estas mia privata sinteno ĉar mi pensas, ke veraj spiritistoj ne havas apartajn religiajn momentojn. Tiaj personoj ĉiam klopodas ne dividi la mondon en religian kaj nereligian partojn. Mi laboras en evangelizado de infanoj, prelegas pri Spiritismo kaj verkas artikolojn por ĵurnaloj kaj revuoj.

## LIBROJ

Krom La Libro de la Spiritoj kaj La Evangelio laŭ Spiritismo, mi indikus Paŭlo kaj Stefano(n), Antaŭ du mil Jaroj(n), Nia Hejmo(n) kaj la aliajn verkojn de Andreo Ludoviko jam esperantigitajn, ĉar pere de ties legado oni havas bonan oportunon lerni Spiritismon kaj samtempe praktiki Esperanton.

## SE VI POVUS REVENI EN LA TEMPON, ĈU VI FARUS ĈION DENOVE PRI ESPERANTO KAJ SPIRITISMO? KIAL?



Ne nur ĉion, sed multe pli, ĉar mi pensas, ke nuntempe mi estas iom pli kapabla ol antaŭe. Spiritismo kaj Esperanto nutras mian vivon. Verdire, mi ne estas kapabla imagi mian vivon sen **SPIRITISMO KAJ SEN ESPERANTO.**

## AMUZIĜO

Mi ne ofte vidas televidon nek iras al kinejo, ĉar nuntempe estas tre malfacile trovi ion vidindan. Mi ŝatas legi, korespondi per interreto, konversacii pri Spiritismo kaj Esperanto. Mi ne serĉas amuzon, ĉar mia vivo jam entenas ĝin.

## FUTURO

Daŭrigi tion kion mi faras: fervore disvastigi Spiritismon kaj Esperanton. Ankaŭ labori en la kampo de evangelizado de infanoj dum mia lasta tempo sur la Tero.

→



# José Passini

## PENSOJ

**DIO –** Mi ne sentas min kapabla difini Dion. Mi nur klopodas senti Dion. Mi ĉiam memoras la saĝajn, amajn vortojn de Zamenhof per kiuj li komencis la Preĝon sub la Verda Standardo, kiun li faris ĉe la malfermo de la Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo sur Maro, kiam li elvokis Dion: …potenca senkorpa mistero, fortego la mondon reganta, granda fonto de amo kaj vero kaj fonto de vivo konstanta.

**ZAMENHOF –** Unu el la plej grandaj misiuloj venintaj al la Tero. Ni ankoraŭ ne havas sufiĉan distancon en la tempo, kiu ebligos nin vidi lian staturon. La venontaj generacioj malkovros kaj omaĝos lin! Verdire, la plimulto de la homoj ne havas staturon kiu permesus al ili vidi la altecon de tiu grava Misiulo.

**AMO AL LA PROKSIMULO –** Mi klopodas vidi la proksimulon kiel la plej gravan kaj veran reprezentanton de Dio en mia vivo. La ĉefa instruo de Jesuo estas amo al la proksimulo… ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidas, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidas. (I Jo, 4: 20).

**INTERNA IDEO DE ESPERANTO –** Vera himno de amo kaj frateco. Sendube ĝi kondukas kaj subtenas Esperanton, kiel aman ligilon al la tuta Homaro, kaj profunde tuŝas la korojn de ĉiuj, eĉ de ateistoj. Sen la interna ideo, Esperanto ne survivus.

**KION VI BEZONAS POR ESTI FELIĈA? –** Tion kion mi havas: Spiritismon, Esperanton kaj oportunon labori disvastigante ilin.

**VIRTO KIUN VI PLEJ ŜATAS? –** Lojaleco al Dio, al la proksimulo kaj al si mem.

**MALVIRTO KIUN VI PLEJ MALŜATAS? –** Malfideleco.

**KION VI PLEJ AMAS EN LA VIVO? –** La instruojn de Jesuo, kiuj ebligas la konon de mi mem, kaj indikas la vojon al Dio pere de la proksimulo.

**UNU REVO –** Organizado de la homa societo sur la Tero laŭ la modelo de la urbo Nia Hejmo, priskribita de Andreo Ludoviko.


**UNU FRAZO –** Kiam la homoj vivos laŭ la Evangelio de Jesuo, ne mankos laboro, pano kaj komprenado en la Mondo.

**UNU HOMO –** Allan Kardec.


**LASTAJ VORTOJ DE JOSÉ PASSINI –** Mi tre dankas la riĉan oportunon donitan de vi, kiu ebligis al mi paroli pri Spiritismo kaj Esperanto.



José Passini kaj lia edzino Norma



# Giuseppe Grattapaglia



FORPASIS LA 10AN DE JUNIO, en la brazila urbo Alto Paraíso, unu plia eminenta membro de la Brazila Esperanto-Movado, nome nia kara, tre estimata samideano Giuseppe Grattapaglia.




Giuseppe (1931-2023), kune kun sia edzino Ursula Grattapaglia, fariĝis tre konata en Esperantujo pro sia rezigno pri komforta, bonstata situacio kiel inĝeniero de la mondkonata, itala firmao FIAT, por plendediĉi siajn fortojn intelektajn, fizikajn, moralajn, spiritajn al volontula laborado ĉe la Bieno-Lernejo Bona Espero, fondita en 1957 de esperantistoj el Recife, ĉefurbo de la brazila ŝtato Pernambuko, kun la celo alfabetigi, eduki kaj protekti infanojn kaj geadoleskantojn vivantajn en riska socia situacio.

Post ol longe vojaĝadi tra la Centra Regiono de Brazilo, tiuj pernambukanaj esperantistoj atingis la urbon Alto Paraíso (Alta Paradizo) kie ili donace ricevis de pollanda familio vastan terenon kun 484 hektaroj, sur kiu ili fondis la socihelpan edukejon.



La paro Grattapaglia, vizitante la Bieno-Lernejon Bona Espero, tiel forte raviĝis de tiea agado, ke ili forvendis sian tutan havaĵon en Italio kaj Germanio, revenis al Brazilo kaj komencis, ekde 1973, volontulan servadon en Bona Espero.

→



*Giuseppe Grattapaglia*




Tuj poste, ekde 1974, Giuseppe fariĝis administra direktoro de tiu eduka, socihelpa Institucio. De tiam ĝis hodiaŭ la historio de la Bieno-Lernejo estas kontinuaĵo, ĉiam pli kaj pli sukcesa, de la unuatempa celado de ties fondintoj, kaj tiun celadon Giuseppe kaj Ursula altigis ĝis maksimumo.

Ni profitu la okazon por prezenti ian tempolinian liston de elstaraj travivaĵoj de la jam karmemora Giuseppe Grattapaglia: lernis Esperanton en 1948 ĉe Teknika Lernejo de FIAT, en Torino; unuafoja partopreno en Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), en Parizo 1950; vicprezidanto de Torina Esperanto-Centro, de 1960 ĝis 1966, kaj ties prezidanto, de 1967 ĝis 1974; docento de Esperanto en Torina Popol-Universitato; gajnis, ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA, la premion Nova Talento, por novelo “Taglibro de Terloĝanto”.

Giuseppe kaj lia edzino Ursula ricevis multajn honorajn omaĝojn pro laborado por la Bono pere de sia poresperanta agado. Unu el la plej signifaj estis la Medalo de Toleremo de la Fondaĵo Ludoviko Zamenhof, kun sidejo en la pola urbo Bjalistoko, naskiĝurbo de Zamenhof.

→


# LORENZ KAJ LA U.K. EN ITALIO

**ELDONEJO LORENZ** konfirmis sian ĉeeston en la Universala Kongreso, okazonta ĉi-jare en Torino, Italio, de la 29ª de Julio ĝis la 5ª de Aŭgusto. La dato de la prelego de nia Asocio ankoraŭ ne estas konfirmita de la Kongresa Komitato. Ni ankaŭ partoprenos la Movadan Foiron kie ni ekspozicios niajn librojn, aliajn varojn kaj liveros informojn pri Spiritismo.

Alia grava sciigo estas ke ni lanĉos nian jarlibron Almanako Lorenz okaze de la kunveno de nia Eldonejo. Al ĉiuj verkistoj de Almanako Lorenz 2023, ni petas konfirmi sian partoprenon, aŭ ne, en la Kongreso. Se jes, ni liveros al ili la Almanakon en la kongresejo mem.

Do, karaj, ĝis la Kongreso!

108-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
TORINO 29.07-05.08.2023



# Giuseppe Grattapaglia




La solenaĵo por enmanigo de la Medalo al la paro Grattapaglia okazis la 14an de Decembro 2013 en la Ambasado de la Pola Respubliko en Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, dum solena antaŭkristnaska renkontiĝo kun poloj loĝantaj en Brazilo. La Unua Sekretario kaj Konsulo, Dorota Bogutyn, laŭtlegis en la pola lingvo leteron de la Fondaĵo Ludoviko Zamenhof subskribitan de prof. Darius Kijowski kaj de Stanislaw Dobrowolski, respektive prezidanto de la Konsilantaro kaj prezidanto de la Estraro de la Fondaĵo:

“Rekone por la multjara laboro, celanta pli bonan mondon, plialtigon de la vivkvalito de infanoj, ilian klerigon kaj preparon al memstara vivo, i.a. utiligante Esperanton, la neŭtralan lingvon de la monda komunikado, la Konsilantaro de la Fondaĵo Ludoviko Zamenhof decidis distingi, per la Medalo de Toleremo, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia.”

Tiam ankaŭ adresis kortuŝan leteron al la geedzoj, la nepo de Zamenhof, D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof.

Ni finas ĉi modestan omaĝon al Giuseppe Grattapaglia per transskribo de respondo de bonaesperanoj al la demando — kion la institucio bezonas pleje? La respondo troviĝas en la lasta paĝo de la libro Bona Espero – Idealo kaj Realo, kiun aŭtoras Roman Dobrzyński:


→




ALMANAKO
LORENZ
2024

**Artikolistoj de Almanako Lorenz 2024, ne forgesu ke la limdato por liveri viajn tekstojn estas 31/12/2023.**

**“Vivu, kresku kaj floru la verda standardo”.**



# *Giuseppe Grattapaglia*



“Por vivi en Bona Espero oni devas:

1 Ami la naturon laŭ ĉiuj siaj formoj, inkluzive aliajn infanojn;

2 Posedi ian financan sendependecon;

3 Ne havi kutimojn kiel fumon, alkoholon, drogojn, pigrecon, klaĉemon, envion ktp;

4 Praktike koni kelkajn fakojn kiel instruadon, infanan psikologion, administradon, agrikulturon, elektro-mekanikon, hidraŭlikon, masonadon, kuiradon, bakadon, teatron, muzikon ktp;

5 Konante tiujn fakojn, kapabli kaj voli praktike fari ĉion, laŭeble... per nenio;

6 Ne esperi kaj ne fidi je la registaro, ĉar en regionoj kun malmultaj voĉdonantoj, ĉiuj registaroj estas forlasemaj;




7 Ne plendi se la labortago estas 24-hora, la semajno 7-taga kaj la salajro “ĉeko en la Banko Dio-Pagu-Vin”;

8 Esti esperantisto, kio ne necese signifas flue paroli esperanton (la lingvon oni lernas en tri monatoj), sed havi sintenon tutmondan kaj ekumenan;

9 Doni daŭre bonan ekzemplon.



Nun Giuseppe reprenas siajn taskojn transmondajn kiel ano de la seninterrompe aktivanta Transtomba Esperanto-Legio. Dio lin benu! La Patro Ĉiela benu ankaŭ lian same noblan kaj ageman vidvinon, la admirindan samideaninon Ursula Grattapaglia!

Eldonejo Lorenz

# FORPASO DE GIUSEPPE GRATTAPAGLIA

Ursula Grattapaglia



"Grandaj homoj estas tiuj, kiuj sukcesas iom plibonigi la mondon."

Ili scias kiel semi la ĝardenon de simpatio kaj akceptado, per la delikataj floroj de edukado, instruado de valoroj kaj amema zorgado por la planedo kaj ties infanoj.

Tio estis Giuseppe! Lia memoro kaj heredaĵo vivos inter ĉiuj, kiuj lin amis, kaj lia ekzemplo plu verkos la historion de Bona Espero.



Homoj naskiĝis ie, tamen ofte ili serĉas preskaŭ instinkte alian *sian lokon* kaj plejofte ne trovas ĝin. Giuseppe kun sia edzino Ursula serĉis *sian lokon*, ne haste, kaj subite ili renkontis ĝin en la centro de Brazilo.

Ambaŭ kreskis en grandurboj, (Berlino kaj Torino) pro tio eble ili amis la naturon, revis manĝi kion ili mem plantus, sed fari nur tion estus egoismo. Pro tio la esperantista organizaĵo *Fazenda Escola Bona Espero,* kie eblas vivi kaj la egoismon de la vivo en pura naturo kaj samtempan realigon de grava socia agado – *jen ilia loko*! Tie zorgante pri centoj da infanoj en regiono sen lernejoj nek sociaj strukturoj, ili du entuziasme eklaboris por la forgesita kreskanta nova generacio dum preskaŭ 50 jaroj..

Ni adiaŭas nun la vivon de homo, modela ekzemplo de defendanto de Esperanto kaj inspiro por ĉiuj, kiuj havis la privilegion kruciĝi kun lia vivo.

Giuseppe Grattapaglia foriris la 10-an de Junio 2023, por pluvivi inter la steloj de la konstelacio de larĝanimaj, humorplenaj animoj.

Kaj li parolas kiel Sankta Aŭgusteno: *Mi ne estas malproksime, mi estas nur sur la alia flanko de la vojo. Vi, kiuj restis tie, iru plu, la vivo daŭras, ĉarma kaj bela kiel ĉiam estis.*



La senlaca kaj laborema Guiseppe



# NOVA SIDEJO

**KUN GRANDA ĜOJO,** ni sciigas al ĉiuj legantoj de nia bulteno ke, finfine, post 47 jaroj, Asocio Lorenz akiris sian propran sidejon; tamen, ankoraŭ multo restas por fari, ĉar temas pri simpla konstruaĵo kiu bezonas multajn plibonigojn. Se vi volos kunlabori kaj sciigi aliajn detalojn, skribu al ni kaj kun granda ĝojo ni vin informos kaj, inkluzive, alsendos fotojn de la konstruaĵo.

**editora _lorenz@uol.com.br**



**"Vere, vere, mi diras al vi: Ne Moseo donis al vi tiun ĉielan panon; sed mia Patro donas al vi la veran ĉielan panon. Ĉar la pano de Dio estas tiu, kiu malsupreniras de la ĉielo kaj donas vivon al la mondo."**

(S. Johano VI: 32-33)


Jam estas tempo por aliĝi aŭ reaniĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo la ano ricevos nian jarlibron, la **ALMANAKO LORENZ**, la trimonatan bultenon **KOMUNIKOJ** kaj ankaŭ rajtas elekti du librojn el nia katalogo, kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon:

**editora_lorenz@uol.com.br**

**(21) 98427-8080**

Karaj eksterbrazilaj gelegantoj de **KOMUNIKOJ** en la tuta mondo! Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron **ALMANAKO LORENZ**, tute senpage, en pdf-a aŭ papera versio, sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso. Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:

**editora_lorenz@uol.com.br**













